

**Eliza Orzeszkowa**  
**Bona sinjorino**



Eldonita de GEO

2015

**Eliza Orzeszkowa**

# **Bona sinjorino**

**El la pola tradukis**

**Kazimierz Bein – Kabe**

Eldonita de GEO

2015

# **La Enhavo**

[Pri la aŭtorino](#)

[Ĉapitro I](#)

[Ĉapitro II](#)

[Ĉapitro III](#)

## Pri la aŭtorino

Eliza Orzeszko (*Orzeszkowa*, prononcu: *Oĵeŝkova*) naskiĝinta en la jaro 1842 en Mintovŝĉizna ĉe Grodno (*Litvuj*) estis sendube la plej eminenta pola proza verkistino. El ŝiaj kreaĵoj fluis sento de altruismo, de amo por ĉiuj anoj de la homa societo, precipe por la laborantoj kaj suferantoj. Profunde virina, patrina amo karakterizas ŝian rilaton al la patrujanoj. Ŝi nutris, instruis, edukadis ilin per siaj verkoj, por kiuj la kondukantan ideon ŝi ĉiam ĉerpadis el plej pura fonto de boneco kaj nobleco. Batalante kontraŭ facilanimeco, aristokrataj pretendoj, egoismo, hipokriteco, ŝi alvokis al prudenta organiza laboro kaj al frata amo inter la diversaj klasoj. Simila al patrino ĉe l' lito de malsana amata infano ŝi revis pri ilia resanigo kaj refortigo, necesaj por vivi kaj plenumi la reciprokajn devojn. Neniam forlasante sian celon kaj ne volante esti revolucŭstino sed nur reformistino, ŝi instigis al reciproka amo kaj progreso, kiu alproksimigos la feliĉon de la homa societo. La pola nacio, kiu ŝatas ŝin ne nur kiel verkistinon, sed ankaŭ kiel edukistinon de generacioj, honorigis ŝin en 1907 per solenaj jubileaj festoj aranĝitaj en ĉiuj urboj, kaj per fondado de instituto pedagogia de ŝia nomo en Varsovio.

# Ĉapitro I

Je la mano kondukata de Janowa (*legu: Janova*), la edzino de la masonisto, la etulo eniris en la belan salonon de sinjorino Evelino Rzycka (*legu: Jicka*). Timigita kaj ravita, ĝi trotetis per malgrandaj paŝoj sur la glitiga pargeto kaj estis preta – laŭ la cirkonstancoj – eksplodi per ploro aŭ per rido. Giaj koralaj lipoj tremis kaj kuntiriĝis por ploro; la grandaj safiraj pupiloj brilis de miro kaj scivolo, la bele skulptitan frunton ĉirkaŭis densaj, densaj haroj de la koloro kaj brilo de malhela oro. Tio estis kvinjara knabino, tre bela. Apud la vastkorpa kaj forta virino, kiu kondukis ŝin, ŝi similis en sia perkala jupo, longa ĝis la tero, blankan papilion kun kunmetitaj flugiloj. Kelke da paŝoj de la sojlo ŝi ektremis de teruro kaj jam malfermis la buŝon por laŭta krio, sed subite la sento de timo cedis al ĝoja impresio: vivege elŝirante sian manon el la dika mano de Janowa kaj sidiĝante sur la pargeto, ŝi komencis kii ridante kaj karese: Hundeto, hundeto! La unua renkonto, antaŭdiranta en la komenco katastrofon, ricevis tute amikan karakteron. La malgranda grifono, kiu sin ĵetis al la enirantoj kun akra kaj pepanta bojado, haltis antaŭ la infano, sidanta sur la planko, kaj komencis ĝin rigardi per paro da nigraj, brilantaj, inteligentaj okuloj. La infano dronigis en ĝiaj haroj, blankaj kaj longaj, siajn malgrandajn, ruĝajn manetojn. Sed en la sama momento super la du estaĵoj, koniĝantaj unu kun la alia, haltis virino ĉirkaŭ kvardekjara, brunulino ankoraŭ bela, alta kaj nigre vestita. La masonistino, klinita ĝis la planko, kisis ŝian blankan manon.

– Helka! Kial vi ne kisas la manon de la sinjorino! Oni rigardu ŝin! Ŝi ludas kun la hundo! Via sinjorina moŝto ne koleru! Ŝi estas ankoraŭ tiel malsaĝa!

Sed sinjorino Evelino tute ne intencis koleri. Kontraŭe, ŝiaj nigraj okuloj, plenaj de fajro kaj kora sentemo, kun admiro estis fiksitaj sur la vizaĝo de la infano, kiun Janowa levis al ŝi per sia dika mano. Helka havis nun larmojn en la safiraj pupiloj kaj per ambaŭ manoj sin tenis je la jupo de Janowa.

– Ni faris, via sinjorina moŝto, por la infano ĉion, kion ni povis, sed kompreneble ĉe malriĉaj homoj ŝi ne lernis la ĝentilecon... Nur nun Dio donacas al la orfo...

– Orfo! – ripetis kortuŝite sinjorino Evelino kaj, klinita super la infano, volis kredeble preni ĝin sur la brakojn. Sed subite ŝi reiris. Esprimo de kompato aperis sur ŝia vizaĝo.

– Mizera! Kiel ŝi estas vestita! – ekkriis ŝi – la jupo longa ĝis la tero... Ŝi ekridis.

– Kia dika ĉemizo! Kaj la haroj!... Ŝi havas belegajn harojn, sed ĉu oni plektas la harojn de tia infano!... Kiaj dikaj ŝuetoj kaj sen ŝtrumpoj. Ŝi rektigis sin, tuŝis per la fingro arĝentan sonorilon, ĉe kies akra longa sono Helka ekridis, kaj Janowa larĝe malfermis la okulojn.

– Fraŭlinon Czernicka (*legu Ĉernjecka*)! – diris ŝi mallonge al la lakeo, aperanta en la pordo. Post unu momento, per rapidaj paŝoj eniris virino tridekjara, vestita per malvasta

vesto, alta, malgrasa, kun malbela kaj velkinta vizaĝo, kun korve nigraj haroj, kunigitaj post la kapo per testuda kombilo. De la sojlo ŝiaj vivaj okuloj ĵetis sur la masonistinon kaj la alkondukitan infanon nuban rigardon, sed kiam ŝi proksimiĝis al ŝia sinjorino, sereniĝis ŝia rigardo, kaj sur la mallarĝaj, velkintaj lipoj aperis humila kaj flatema rideto. Sinjorino Evelino ekscitite sin turnis al ŝi.

– Mia kara Czernicka, jen la infano, pri kiu mi parolis kun vi hieraŭ. Rigardu! Kiaj trajtoj... kia delikateco de la vizaĝkoloro. kaj la okuloj. la haroj. se ŝi nur iom grasiĝus kaj akirus ruĝajn vangojn, oni povus prezenti ŝin al iu nova Rafaelo kiel modelon por Kerubo... Kaj krom tio orfino!... Vi scias, kiel mi trovis ŝin ĉe tiuj. bonkoraj homoj, en tiel malgaja loĝejo... malseka, malluma... Ŝi ekbrilis tie antaŭ miaj okuloj kiel perlo inter balaaĵoj... Dio sendis ŝin al mi... Sed, mia kara Czernicka, oni devas ŝin bani, kombi, vesti. Mi petas vin, post unu, post du horoj, ne pli malfrue, la infano devos havi tute alian aspekton.

Czernicka ridetis agrable, kun admiro krucis la manojn sur la brusto kaj balancis la kapon, por rapide jesigi ĉion, kion diris ŝia sinjorino. Sinjorino Evelino estis en plej bona humoro. Bonhumora ankaŭ fariĝis la servistino, kiu antaŭ momento eniris malgaja kaj nuba. Kiel antaŭe Helka antaŭ la hundo, tiel nun ŝi sidiĝis sur la planko antaŭ Helka kaj komencis babili, imitante la pepadon de la infano. Poste kun granda peno, zorge kaŝita, ŝi kaptis Helkan sur siajn sekajn, energiajn brakojn, levis la knabinton de la planko, alpremis al la brusto kaj elportis ŝin el la salono, kovrante ŝian vizaĝon per bruaj kisoj. Sinjorino Evelino, radianta kaj apenaŭ haltiganta la larmojn de la kortuŝo, parolis ankoraŭ iom kun Janowa. La masonistino, kuraĝigita de la ekstrema boneco de la sinjorino kaj ankaŭ kortuŝita, ploris kaj duan fojon rakontis la historion de Helka, orfino de ŝia parenco, same kiel ŝia edzo, masonisto, kiu mortis, falinte de trabaĵo; baldaŭ poste mortis de la ĥolero lia edzino, la patrino de Helka. Orfino sen patro kaj sen patrino! Ambaŭ virinoj, la vidvino de riĉa sinjoro kaj la edzino de masonisto, estis kortuŝitaj ĝis larmoj ĉe la sono de ĉi tiu vorto. Sinjorino Evelino tre laŭdis la kristanan kompaton de Janowa kaj de ŝia edzo, kiuj donis ĉe si ŝirmon al la mizera kaj tiel bela infano. Janowa, glorante la bonkorecon de sinjorino Evelino, akceptanta la infanon sub sian zorgon, frotis ĝis sanga koloro per la maniko de ŝia brila lana kaftano la vangojn, jam sen tio ruĝajn. Fine la masonistino falus antaŭ sinjorino Evelino sur la genuojn por kisi la randon de ŝia vesto, se sinjorino Evelino ne haltigus ŝin per la vortoj, ke nur antaŭ Dio oni devas fali sur la genuojn; poste ŝi petis la masonistinon, ke ŝi akceptu kelke da rubloj por aĉeti bombonojn por la infanoj. Nun Janowa ekridis tra la larmoj krude kaj gaje.

– Mi donos al ili bombonojn! – ekkriis ŝi – ĉu ili estas sinjoraj infanoj, ĉu ili bezonas bombonojn! Se via sinjorina moŝto estas tiel favora por ni, mi aĉetos por Wicek ŝuojn kaj por Marylka kaj Kasia kaptukojn...

Fine ili adiaŭis unu la alian. Janowa, revenante hejmen, eble dudek fojojn haltis sur la stratoj de la urbo, glorante al dudek personoj la anĝelan bonecon kaj kompaton de sinjorino Evelino. Sinjorino Evelino, post la foriro de Janowa, duonkuŝiĝis sur la kanapo kaj apogis sur la bela mano la frunton, vualitan per sopira kaj samtempe agrabla medito. Pri kio ŝi pensis? Kredeble

pri tio, ke Dio, senlime bona, sendis sur la malluman kaj malvarman vojon de ŝia vivo varman kaj helan sunan radion... Tia radio devis esti de nun por ŝi la bela orfino, okaze trovita hieraŭ kaj hodiaŭ adoptita kiel filino...

Ho, kiel ŝi amos ĉi tiun infanon! Ŝi sentas tion per la pli rapida spirado de sia brusto, per la ondado la vivo kaj juneco, kiu, ŝajnas, subite plenigis ŝian tutan estaĵon kaj kvazaŭ plenblovis la koron. Tiel malplene kaj enue estis al ŝi en la mondo, ŝi sentis sin tiel sola, tia tomba malvarmo jam ĉirkaŭis ŝin! Ŝi jam estis rigidiĝonta, jam proksimiĝis la maljuneco, morta apatio aŭ malluma melankolio jam minacis ŝin, kiam Dio Zorganto pruvis ankoraŭ unu fojon, ke li gardas, ke eĉ en plej profunda malfeliĉo oni ne devas perdi la konfidon al ĉi tiu gardo... Czernicka nur rapide purigu kaj vestu la anĝeleton...

La medito de sinjorino Evelino estis interrompata de du vilaj piedetoj, kiuj grimpante sur ŝiajn genuojn, implikiĝis en la punktoj de ŝia vesto kaj per akraj ungegoj atingis ŝian manon. Vekita, ŝi skuiĝis kaj per kolera gesto forpuŝis de si la trudeman hundon. Li komprenis ŝian koleron kiel gajan ŝercon. Tro longe li estis amata, por facile ekkredi la repuŝon. Li ĝoje pepis kaj ree per la vilaj piedoj ŝiris ia punktojn kaj gratis la atlasan manon de sia sinjorino. Sed tiun ĉi fojon ŝi salte leviĝis de la kanapo kaj sonorigis.

– Fraŭlinon Czernicka! – ŝi diris al la aperanta lakeo.

Czernicka enkuris spiregante, kun ruĝo sur la malhelaj vangoj, kun la manikoj suprenvolvitaj ĝis la kubutoj.

– Mia kara Czernicka! Mi petas vin, prenu Elfon, kaj li restu tie ĉe vi, en la vestejo, por ĉiam. Li ŝiras miajn punktojn, enuigas min.

Kiam la servistino sin klinis por preni la hundon, sur ŝiaj mallarĝaj lipoj glitis stranga rideto. Estis en ĝi iom da sarkasmo, iom da malĝojo. Elf ekmurmuris, reiris kaj volis forkuri de la ostaj manoj, lin kaptantaj, sur la genuojn de sia sinjorino. Sed sinjorino Evelino delikate forpuŝis lin, kaj la ostaj manoj tiel forte lin kaptis, ke li ekpepis. Czernicka dum unu momento fiksis rapidan rigardon sur la vizaĝo de la sinjorino.

– Kiel netolerebla fariĝis Elf... – murmuretis ŝi ne sen ŝanceliĝo en la voĉo.

– Netolerebla! – ripetis sinjorino Evelino kaj kun gesto de malkontenteco aldonis: – Mi ne komprenas plu, kiel mi povis tiel ami tian tedan estaĵon.

– Li estis iam tute alia!

– Ĉu ne vere, Czernicka, li estis tute alia? Li estis iam belega. Kaj nun.

– Nun li fariĝis enuiga...

– Terure enuiga... Prenu lin en la vestejon, kaj li ne montru sin plu en la ĉambroj. Czernicka estis jam ĉe ia sojlo, kiam ŝi ree ekaŭdis:

– Kara Czernicka!

Ŝi returnis sin kun humila rapideco kaj flata rideto. – Kaj nia knabino.?

– Ĉio estos farita laŭ viaj ordonoj, sinjorino. En la banejo la bano jam estas preta, Paŭlino banos Helkan.

– Fraŭlinon! – kvazaŭ nevole interrompis sinjorino Evelino.

– Fraŭlinon. Mi tranĉas vesteton el la blua kaŝmiro, tiu en la komodo.

– Mi scias, scias.

– Kazimirino kuris en la butikon de ŝuoj, Janowan mi sendis en la magazenon de preta tolaĵo. la vesteton mi dume almenaŭ duonkudros: mi nur petas vin, sinjorino, pri punktoj, rubandoj kaj mono por ĉio.

Da punktoj, rubandoj, tuloj, gazoj, kaŝmiroj, atlasoj multe estis en la ŝrankoj kaj komodoj, plenigantaj kelke da ĉambroj de la vasta kaj bele aranĝita somerdomo de sinjorino Evelino. Czernicka sufiĉe longe malfermis kaj fermis la ŝrankojn kaj tirkestojn, ne ĉesante eĉ dum unu minuto premi en la mano bankan bileton de alta valoro. Poste en la vestejo oni aŭdis grandan bruon de akra marĉandado kaj aĉetado; poste granda parto de objektoj, elprenitaj el la ŝrankoj kaj komodoj, kaj parto de la valoro de la banka bileto malaperis en senfunda kofro – persona propraĵo de la ĉambristino. Fine, kun serena vizaĝo, videble kontenta de la profito, ricevita de la veno de la orfino en la domon, ŝi komencis rapide duonkudri kaj fiksi per pingloj la rapide preparatan veston. Nur en la sekvanta tago tajloroj, ŝuistoj kaj kudristinoj devis komenci la efektivan laboron por la vestaro de la fraŭlino. Dume la fraŭlino jam banita kaj kombita, sed ankoraŭ en dika ĉemizo kaj nudpieda, sidis en la ĉambro de Czernicka sur la planko kaj inter plej koraj karesoj kun Elf ŝajnis forgesi pri la tuta mondo.

Pri la tuta mondo forgesis ankaŭ sinjorino Evelino, dronanta en profunda medito. La mediton nenio plu interrompis nun. En la vasta salono, brilanta de la speguloj, pentraĵoj kaj puncaj damaskoj, regis profunda silento. Tra la duonmalfermitaj pordokurtenoj oni povis vidi kelke da pli grandaj kaj pli malgrandaj ĉambroj, ankaŭ dronantaj en silento kaj duonlumo. La oblikvaj radioj de la subiranta somera suno, penetrantaj tra la fendoj de la mallevitaj tabuletkurtenoj, glitis tie ĉi kaj tie sur la muroj, tapiŝoj kaj oritaj kadroj de la pentraĵoj. De ekstere flugis odoroj de la florantaj rozujoj kaj pepado de la birdoj; pli profunde, en la manĝoĉambro, mallaŭte sonoris la teleroj, dismetataj por la vespermanĝo.

Sinjorino Evelino meditis pri sia malfeliĉo. Ŝi tute ne trograndigis, pensante, ke ŝi estas tre



malfeliĉa. Efektive, vidvino jam de multaj jaroj, sen infanoj, posedanta koron varmegan, sola, ŝi eĉ ne estis sufiĉe riĉa, por ke ŝi povu ĉiam vivi tie, kie la vivo prezentis al ŝi plej multe da allogoj kaj malplej multe da malĝojo kaj enuo. Sia posedaĵo estis, vere, sufiĉe granda, tamen diversaj monaj aferoj alforĝis ŝin iufoje por iom da tempo al loko tiel malbela, malĝoja kaj enuiga, kia estis Ongrod. Precipe en la nuna momento en la bela kaj vasta bieno, kiun ŝi posedis en la ĉirkaŭaĵo de Ongrod okazis io eksterordinara. Estis tie iuj kontraktoj farotaj, ŝuldoj pagotaj, neeviteblaj elspezoj por la mastrumo – kaj ĉio ĉi senigis sinjorinon Evelinon je la ebleco, forveturi eksterlandon, aŭ almenaŭ loĝi en la plej granda urbo de la lando. Ŝi pasigis ĉi tie jam du jarojn, jarojn malfacilajn kaj lacigajn. Fremda por ĉio kaj por ĉiuj, ĉirkaŭata de la prozaj vidaĵoj de malgranda urbo, sopiranta al altaj artistaj ĝuoj, kiuj estis ĝis nun la plej granda allogo de ŝia vivo kaj je kiuj ĉi tie ŝi kompreneble estis tute senigita, ŝi vivis kiel ermitino, fermita en sia somerdomo kun siaj pentraĵoj, fortepiano, Czernicka kaj Elf. Sia vivo ĉi tie estis tiom pura kiom malĝoja, tamen la trankvilo de la konscienco ne estis komplementa. Ŝi faris nenion bonan kaj riproĉis tion al si ofte kaj akre. La deziro fari bonon estis unu el la plej vive vibrantaj kordoj de ŝia animo. La bonfarado atingis ĉe ŝi gradon de pasio kaj multfoje, multfoje en la vivo alportis al ŝi moralajn ĝuojn, anstataŭantajn la feliĉon, kiun ŝi renkontis neniam. Sed. estis tiel aliloke. Ci tie ŝi eĉ ne sciis, kiel kaj kion fari por satigi la plej profundan bezonon de sia nobla koro. Vere, de tempo al tempo, al tiuj aŭ al aliaj ŝi donis malavarajn almozojn, sed tio ne plenigis ŝian tempon, ne kontentigis la koron kaj la konsciencon. Ŝi kutimis al la bonfarado de la grandaj urboj, laborema, agema, plenumata sub la direkto de kleraj pastraj gvidantoj, kiuj kondukis la bonfarantojn al la subtegmentoj de altaj domoj, en la subterajn mallumajn loĝejoj, en la rifuĝejojn kaj azilojn, al la tabloj kun arĝentaj pladoj, lokitaj en la vestibloj de la preĝejoj k. t. p. Manko de la manieroj tiel bonfari turmentis ŝin kaj verŝis unu guton plu en ŝian maldolĉan pokalon. Subite en Ongrod oni fondis societon de tiel nomataj bonfaremaj virinoj. Sinjorino Evelino, kiel la plej riĉa kredeble loĝantino de la urbo, estis invitita partopreni en la aĝado de la societo. Tio estis la unua ĝojo, kiun ŝi ĝuis post dujara soifo. Ŝi do povos fari bonon! La fortoj de la koro, da kiuj ŝi tiom sentis en si, trovos por si forfluan! Sia okulo verŝos ankoraŭ, kiel iam, larmojn de la kompato kaj kortuŝeco, vidante la homan mizeron! Siajn orelojn karesos dankaj kaj benaj vortoj de tiuj, inter kluĵ ŝi aperos kiel anĝelo de helpo kaj konsolo! Ŝi tuj venis al la alvoko. Oni montris al ŝi la kvartalon de la urbo, kie ŝi devis serĉi la mizerulojn. Ŝi serĉis. Serĉante ŝi venis foje en la domon, loĝatan de la familio de la masonisto, kaj ekvidis Helkan. La infano sin prezentis al ŝi en pentrinda pozo; ĝi ludis, ŝajnas, kun hundo aŭ kato, aŭ eble ĝi sidis antaŭ la sojlo de la domo kaj ĝiajn harojn kombis la sunaj radioj; aŭ eble, mirigita de la apero de kaleŝo, ĉevaloj kaj bela eleganta sinjorino, haltis ĉe la sojlo kiel ŝtonigita kaj fiksita sur ŝi siajn pupilojn, en kiuj ŝi ekvidis la varmegan bluan de la itala ĉielo – unuvorte, ĝi tuj ŝajnis al ŝi neordinara kaj bela. Ŝi almetis siajn lipojn al la vangoj de la infano, sur kiuj estis ankoraŭ restaĵoj de ĵus manĝita gria supo kun lardo; sed malgraŭ tio ŝia koro komencis bati pli vive, kaj ĉe la sono de la vorto: "orfo!", dirita de Janowa, larmo de kompato kaj kortuŝeco aperis en ŝiaj okuloj. Ŝi ekdeziris la infanon, ŝi ekdeziris ĝin kiel sian ekskluzivan proprajon, kun entuziasmo kaj forto de animo pasia kiel vulkano, kaj sola kiel ŝipo, eraranta sur la maraj vastaĵoj dum ventego... Nun la objekto de ŝiaj deziroj jam estis sub ŝia tegmento. Oni donis ĝin al ŝi por ĉiam kaj,

vere, sen malfacilaĵoj! Nun, amante la infanon, ŝi trankviligos sian sopirantan animon, kontentigos sian konsciencon, kiu ordonas al ŝi fari bonon!. Sed kie ĝi estas, la bela infano? Kie estas la anĝelo de la konsolo kaj trankviligo, sendita de la Providenco? Kial Czernicka ne alkondukis ŝin ankoraŭ? Mizerulino! Kredeble ŝi ankoraŭ ne estas vestita! Sed certe ŝi jam estas lavita kaj banita. Ni iru en la ĉambron de Czernicka ĉirkaŭpreni, kisi la infanon, karese alpremi ĝin al la koro.

Ŝi salte leviĝis de la kanapo, kuris tra la salono kaj en la mezo de la vojo, kun la manoj krucitaj sur la brusto, haltis. En la kontraŭa pordo Czernicka aperis, kondukante je la mano Helkan, sed kiel ŝanĝitan! Kia metamorfozo! La blanka papilio kun kunmetitaj flugiletoj fariĝis brila kolibro. Ruĝaj rubandoj, kvazaŭ plumoj aŭ flugiletoj, varie kolorigis la bluan veston. El la lanugo de la blankaj punktoj sin eligis rondaj piedetoj en malvastaj ŝtrumpetoj, delikataj kiel aranea reto, kaj malaperantaj en malgrandaj bluaj ŝuoj; la fajraj haroj kombitaj, parfumitaj, estis kunigitaj per testuda buko. Timigita kaj ravita de la eleganta vesto, ebriigita de la bonodoro, eliĝanta el ŝiaj haroj kaj punktoj, Helka staris ĉe la sojlo de la salono kun plora grimaco sur la lipoj. Timante ĉifi la veston, ŝi disetendis en la aero siajn malgrasajn brakojn; ŝiaj nekuraĝaj kaj malsekaj okuloj jen sin mallevis al la luksaj ŝuetoj, jen levis sin al la vizaĝo de sinjorino Evelino. Sinjorino Evelino saltis al la infano kaj, ĉirkaŭpreninte ĝin, nur nun komencis ĝin kovri per varmegaj kisoj. Poste ŝi kondukis Helkan en la manĝoĉambron, kie ŝi sidiĝis kun ŝi ĉe la tablo kun bela porcelano kaj bongustaj frandaĵoj. Post duonhoru Czernicka, eniranta en la manĝoĉambron, trovis Helkan sidanta sur la genuoj de la nova zorgantino kaj jam tute intima kun ŝi. La ekstrema boneco kaj sentema koro de sinjorino Evelino rapide verŝis en la koron de la infano kuraĝon kaj konfidon. Kun vangoj iom ŝmiritaj per graso, sed ĉi tiun fojon ne per gria supo kun lardo, sed per kuko kaj konfitaĵoj, ŝi etendis sian malgrandan fingreton al diversaj objektoj, ĝis nun nekonataj, kaj demandis pri ilia nomo.

- Kio estas tio, sinjorino, kio?
- Taso – respondis sinjorino Evelino.
- Tasjo. – kun iom da peno ripetis Helka.
- Kaj france: la tasse.
- Tas, tass, tastastas! – pepis Helka.

La virino kaj la infano ŝajnis estaĵoj perfekte feliĉaj. Czernicka kun sia glaso da teo, forlasante la manĝoĉambron, ridetis laŭ sia ordinara maniero, iom sarkasme, iom melankolie.

Tia estis la unua tago de la estado de Helka en la domo de sinjorino Evelino, kaj ĝin sekvis longa vico da tagoj similaj aŭ eble ankoraŭ pli feliĉaj por la virino kaj por la infano. Ili amuziĝis bonege. En la someraj monatoj tra la bela ĝardeno, ĉirkaŭanta la somerdomon, de la mateno ĝis la vespero preskaŭ flugis la knabineto, simila al varikolora kolibro. Malgrandaj

ŝiaj piedoj, en elegantaj ŝuetoj kuris sur sablitaj vojetoj ĉirkaŭ bedoj, plenaj de floroj; ŝia kapo kovrita de la oraj haroj kaj ornamita per floroj glitis super la malaltaj grupoj de verdaĵo, kvazaŭ superaera, anĝela fenomeno. La pepado kaj rido de la infano sonis malproksimen, ĝis trans la ferajn kradojn, apartigantajn la ĝardenon de la eksterurba strato. Sinjorino Evelino, sidante sur la vasta bela balkono, dum tutaj horoj forgesis pri la libro, tenata en la mano, sekvis per la rigardo la subtilan, malpezan, elegantan estaĵon, kaptis per la orelo ĉiun sonon de ŝiaj pepado kaj rido, kaj iufoje ŝi kuris malsupren de la ŝtuparo de la balkono kaj komencis persekuti ŝin sur la vojetoj de la ĝardeno. Tiam dum la infana ludo, al kiu ŝi ŝajnis sin doni per la tuta koro, oni povis plej bone rimarki, kiom da fortoj kaj da vivo estis ankoraŭ en ĉi tiu jam neĵuna virino. Ruĝiĝis ŝiaj vangoj, la nigraj okuloj brulis, la talio ricevis infanan graciecon. kaj flekseblecon. La persekuto finiĝis ordinare tiamaniere, ke Helka sin ĵetis sur la kolon de sinjorino Evelino; sekvis reciprokaj karesoj kaj longa sidado sur la herba tapiŝo, inter floroj, el kiuj ili kunmetis bukedon kaj kronojn. Trans la feraj kradoj la pasantoj ofte haltis, penante tra la truoj vidi la belan grupon. Ĝi ŝajnis tiom pli bela, ke ĝia fono estis palaceto, pentrinde blanka meze de la ĝardeno, tiom pli kortuŝanta, ke oni sciis, ke la virino ne estas la patrino de la infano. La du estaĵoj, fremdaj per la sango kaj tiel intime kunigitaj, faris plej grandan impreson dum la blankaj vintraj tagoj, kiam ili eniradis en la plenplenan preĝejon de la urbo. Al la etulino. tuta en atlasoj kaj cignaj lanugoj, kaj al la virino, en zibeloj kaj veluro, sin turnis tiam kelke da miloj da homaj okuloj. La infanon, nun ĉiam ruĝan kaj ridetantan, oni komparis kun rozo, eliĝanta el sub la neĝo; sed kian komparon oni povis trovi por la zorgantino? Oni nomis ŝin simple sankta! Per tia zorgo kaj amo ĉirkaŭi infanon fremdan, de malalta deveno, orfon! Tiel uzi sian riĉaĵon, – vere, tio estis inda de admiro. Kaj efektive ĉiuj admiris sinjorinon Evelinon, ĉiufoje, kiam ŝia serena kaj meditema vizaĝo pasis tra la flanko de la belega templo; Janowa, staranta ĉe la pordo puŝata de entuziasmo, per la tuta forto de siaj ambaŭ kubutoj dispuŝis la popolamason, brue falis sur la genuojn, dronigis sian rigardon en la videbla por ŝi supro de la granda altaro, kaj viŝante per la maniko de sia festa kaftano larmojn sur la ruĝa vizaĝo, preĝis preskaŭ laŭte:

– Kaj la eterna feliĉo lumu al ŝi dum jarcentoj de jarcentoj, amen.

Sendisiĝaj tage, ili ne forlasis unu la alian ankaŭ nokte. La malgranda, el nuksarbo skulptita lito de Helka, vera majstroverko de la lignaĵista arto, estis lokita senpere apud la lito de sinjorino Evelino. En ĝi, senvestigita per la propraj manoj de la zorgantino kaj vestita per batista nokta ĉemizeto, Helka ekdormis ĉiutage sur delikata tolaĵo, kovrita per brodaĵoj. Serena, ridetanta dormo de perfekte feliĉa estaĵo! Sinjorino Evelino, kuŝigante ŝin por la dormo, faris super ŝi en la aero la signon de la kruco, kaj kiam Czernicka dismetis ia litkovrilon en pentrindajn drapiraĵojn, la sinjorino diris:

– Kiel bela ŝi estas, kara Czernicka!

– Kiel anĝelete – respondis la ĉambristino.

Iufoje Helka, ankoraŭ ne dormanta, aŭdis la interparoladon, kaj el la blankaj lanugoj de la

lito eksplodis infana rido, interrompata de ekkrioj:

- La sinjorino estas pli bela, pli bela, pli bela!
- Kion ŝi deliras, Czernicka! – kun profunda kontenteco ridetis sinjorino Evelino.
- Kiel saĝa estas la infano! Kiel ĝi amas vin! – miris Czernicka.

Samtempe, dum tutaj tagoj kaj vesperoj, en la salono, ĝardeno kaj dormoĉambro preskaŭ seninterrompe havis lokon la eduko de Helka. Sinjorino Evelino instruis ŝin paroli france, gracie paŝi, sidi kaj manĝi, bele vesti la pupojn, gustoplene kunmeti la kolorojn, sin kuŝigi por la dormo en ĉarma pozo, kruci la manojn kaj levi la okulojn al la ĉielo dum la preĝo. Ĉiuj ĉi instruoj estis donataj kaj akceptataj en perfekta reciproka harmonio kaj amikeco. En ludoj kaj ŝercoj la infano kleriĝis rapide kaj gaje: post unujara restado en la domo de la zorgantino, Helka jam flue babilis france, sciis memore multajn francajn preĝojn kaj versaĵojn. Kiam ŝi kuris, iris aŭ manĝis, Czernicka, rigardante ŝin, diris kun admiro al la sinjorino:

- Kiaj movoj! kia gracio! Vere, oni povus pensi, ke la fraŭlino naskiĝis en palaco!
- Donaco de Dio, mia Czernicka – respondis sinjorino Evelino.

Sed la plej grandan admiron de sinjorino Evelino kaŭzis la eksterordinara sento pri la belo, kiu sin montris en ŝi pli kaj pli klare. Efektive, Helka ricevis inklinon al la elegantaj kaj belaj objektoj, inklinon, preskaŭ similantan al pasio. Plej malgrandan disonancon de la koloroj ŝi tuj rimarkis, plej subtila tavolo de polvo sur la planko ekscitis ŝian abomenon. Ŝi jam bonege taksis la gradon de la beleco de ĉiu meblo; kiam ŝi estis laca kaj volis ripozi, ŝi sciis elekti kaj montri al la mastrino de la domo la plej komfortan meblon; kelke da fojoj ŝi verŝis maldolĉajn larmojn, kiam oni alportis al ŝi ŝuetojn ne tiel belaj kiel tiuj, pri kiuj ŝi revis. Sinjorino Evelino kun plezuro rigardis la rapidan evoluon de la estetikaj inklinoj de la infano.

– Mia Czernicka – diris ŝi – kian emon ŝi havas al ĉio, kio estas bela, kian delikatan naturon kaj sentemon al ĉiu tuŝo de la ekstera mondo! Dio mia, se mi povus preni ŝin kun mi Italujon! Kiel feliĉa estus la etulino sub la bela itala ĉielo, en la dolĉa klimato, inter la belegaj vidaĵoj de la itala naturo...

La revo, veturi kun Helka Italujon, plifortiĝis ankoraŭ en sinjorino Evelino, kiam iutage ŝi malkovris en la infano talenton, rimarkindan, grandan talenton por la kantado. Helka finis tiam jam sian okan jaron kaj estis en la domo de sinjorino Evelino preskaŭ tri jaroj. Foje, en serena aŭtuna tago, Helka por unu momento lasita sola, sidis sur la balkono inter amaso da kusenoj, alportitaj tien por ŝi, kaj ornamante pupon, preskaŭ same grandan kiel ŝi mem, sed ankoraŭ pli lukse vestitan, kantetis unu el la multenombraj francaj kantoj, kiuj ŝi sciis memore. Iom post iom tio fariĝis vera kantado; la pupo falis el ŝiaj manoj sur la kusenojn, kaj Helka, turninte la okulojn al la ĉielo, kun la manoj krucitaj sur la brusto, laŭte kaj plende kantis:

*Le papillon senvola.*

*La rose blanche seffeuilla.*

*La la la la la la la...*

Ŝia voĉo estis pura kaj forta. En la varmege amata kaj karesata infano vekiĝis sendube kora sentemo kaj kompatemo, ĉar la malĝojan historion de la rozo ŝi kantis kun tia ama sento, ke ŝia eta brusto leviĝis alte kaj sur la malheleoraj okulharoj ekbrilis larmo. Sinjorino Evelino, nevidate observanta ŝin tra la fenestro de la salono, dronis en admiro kaj de tiu tago komencis dum la vesperoj instrui al ŝi la muzikan arton.

Ĉiuvespere en la malgranda ĉambro de Czernicka lampo brulis sur la tablo, la murhorloĝo unutone tiktakis super la senfunda kofro, post kurtenoj estis videbla lito, simple aranĝita. Silente estis tie. Tri kudristinoj dormetis super sia laboro aŭ mallaŭte, mallaŭte murmuretis en la najbara ĉambro: el la profundo de la domo, el la salono flugis apartaj, longaj tonoj de la fortepianaj klavoj, tuŝataj unu post alia. De tempo al tempo eksonis: f, g, h k.t.p., laŭte elparolata de sinjorino Evelino; iufoje gamo de infana rido ĵetis kelke da arĝentaj tonoj, aŭ estis aŭdebla infaua kanto, mallaŭtigita de la interspaco:

*La rose blanche seffeuilla.*

*La la la la la la la.*

Sur la hela fono, lumigita de la lampo, la figuro de la ĉambristino, alta, maldika, en malvasta vesto, kun la kombilo, alte superstaranta la kapon, prezentis malhelajn kaj akrajn konturojn. Ĉe ŝiaj pledoj, sur mola, bela piedkuseno, kuntiriĝinta kaj malgaja kuŝis Elf. Ŝiaj sekaj brakoj, en malvastaj manikoj kaj ŝiaj longaj, ostaj manoj rapide kaj lerte sin movis super la teksaĵo, kuŝanta sur la genuoj. Ŝi kudris diligente, sed ĉiufoje, kiam la sonoj de la leciono alflugis al ŝi de la salono, ŝia nuba rigardo sin turnis al la hundo, kuŝanta ĉe ŝiaj piedoj; ŝi tuŝis lin delikate per la ekstremo de la piedo kaj kun la ordinara rideto diris:

– Ĉu vi aŭdas? Ĉu vi memoras? Ankaŭ vi iam estis tie!

Baldaŭ poste plenumiĝis la deziro de sinjorino Evelino; la stato de la monaj aferoj permesis al ŝi veturi eksterlandon por kelke da monatoj; ŝi prenis kun si Helkan; la infano petis la permeson kunpreni Elfon. Ankaŭ Czernicka forveturis kun ili.

## Ĉapitro II

Post kelke da monatoj, en bela somera tago, la somerloĝejo de sinjorino Evelino, duonmorta dum ŝia foresto, reviviĝis. En la ĝardeno floris belaj astrofloroj kaj levkojoj, en la salono brilis la speguloj kaj damaskoj, en la manĝoĉambro mallaŭte sonoris la vitraj kaj porcelanaj vazoj. Sinjorino Evelino sidis en la salono, profunde meditanta, iom malĝoja kaj sopira. Helka ne estis apud ŝi, sed el la profundo de la domo, el la vestejo de tempo al tempo flugis sonoj de ŝia gaja voĉo kaj rido. Czernicka, sidante sur la planko de la vestejo, malfermis la valizojn, elprenante el ili sennombraj objektojn, destinitajn por sennombraj uzoj; tri kudristinoj kaj Janowa, la masonistino, starante ĉirkaŭe, plenaj de scivolo kaj admiro, rigardis jen la fraŭlinon, jen la eligatajn miraklojn de la eŭropaj metioj. Ciuj asertis unuvoĉe, ke la fraŭlino forte kreskis. Efektive, Helka atingis la aĝon, en kiu la knabinoj ricevas la karakterizan longecon de la kruroj, difektantan la harmonion de iliaj formoj. Ci tiuj longaj, maldikaj kruroj, en tre malvastaj kaj altaj gamaŝoj, faris ŝin iom malgracia. La regulara ovaĵo de ŝia vizaĝo perdis sian delikatecon kaŭze de la malgrasiĝo, kredeble de la longa vojaĝo; la malkovritaj brakoj estis malgrasaj kaj ruĝaj. La bela infano komencis aliformiĝi en malgracian maturiĝantan knabinon, kies trajtoj antaŭdiris estontan belan fraŭlinon.

La masonistino, sciigita pri la reveno de la sinjorino kaj de la fraŭlino per unu el la ĉambristinoj, kiun ŝi petis pri tio, ne povis sufiĉe admiri sian malgrandan parencinon kaj poste ŝiajn objektojn, elprenatajn el du apartaj valizoj. Ŝi sidiĝis sur la planko apud Helka, kiu montris al ŝi ĉion kaj klarigis.

– Dua ĉapelo... – ekkriis ŝi – tria... kvara... Granda Dio! Kiom da ĉapeloj vi havas, Helka?

– Tiom, onklino, kiom da vestoj – klarigis Helka – al ĉiu vesto estas konforma ĉapelo.

– Kaj tiu skatolo?

– Tio estas vojaĝa skatolo.

– Por kio ĝi estas?

– Kiel, por kio? Rigardu, onklino, tie ĉi estas diversaj fakoj, kaj en ili ĉio, kion oni bezonas por sin lavi, kombi kaj vesti. Jen kombiloj, sapo, brosetoj, diversaj pingloj, parfumoj.

– Jezuo, Mario! kaj ĉio ĉi estas via?

– Jes, mia. La sinjorino havas pli grandan skatolon kaj mi malgrandan.

En tiu momento Czernicka elprenis el pakaĵo pupojn de diversa grandeco kaj aliajn infanajn ludilojn plej diversajn. Tie estis belaj birdoj, kvazaŭ vivantaj, strangaj bestetoj, arĝentaj kaj oraj mastrumaj vazoj k. t. p. Janowa larĝe malfermis la buŝon, sed en la sama momento

malĝojo vualis ŝiajn okulojn.

– Mia Dio! – murmuretis ŝi kun sopiro – miaj infanoj povus almenaŭ vidi ĉion ĉi.

Helka momenton rigardis ŝin, meditis, poste vive sin ĵetis al siaj ludiloj kaj ĉifonoj kaj kun granda fervoro komencis donaci kelkajn al Janowa.

– Prenu, onklino, la strigon por Marylka kaj ĉi tiun fiŝeton por Kasia... por Wicek estu ĉi tiu harmoniko... oni bezonas nur tuŝi ĝin, kaj tuj ĝi ludas tre bele. Prenu, onklino, prenu!

La sinjorino ne koleros, la sinjorino estas tiel bona kaj tiel amas min. Prenu ankaŭ ĉi tiun ruĝan tukon por Marylka, kaj por Kasia la bluan, mi havas multe da tiaj tukoj, tre multe.

Janowa, kun okuloj plenaj de larmoj, volis kapti la parencon en siajn potencajn brakojn, sed timante ĉifi ŝiajn krispajn kaj malsimplajn vestojn, karesis per la dika mano la atlasan vizaĝon de la infano. Ŝi kategorie rifuzis akcepti la donacojn, sed leviĝante de la planko, ŝi diris:

– Vi estas bona infano! Kvankam vi kreskas por esti granda sinjorino, vi ne malestimas la malriĉajn parencojn, kiuj iam donis al vi ŝirmon.

Kiam Janowa diris tion, Czernicka, klinita ĝis nun super kofro, sin rektigis kaj rapide kun akcento diris aŭ verdire murmuris:

– Eh, mia sinjorino Janowa! Kiu povas scii, kia ŝi estos iam: granda aŭ malgranda?

Janowa respondis nenion, ĉar ŝi rigardis kun plorema rideto al Helka, kiu, ridante kaj saltante sur siaj longaj kruroj kiel gaja kaj petolema katino, rondiris ĉirkaŭ ŝi kaj plenigis ĉiujn ŝiajn poŝojn per bombonoj.

– Tio estas por Marylka – kriis ŝi – tio por Kasia. kaj tio, onklino, por la onklo.

Subite ŝi ekremis kaj fariĝis malĝoja.

– Tiel malvarme estas tie ĉi! – diris ŝi per la koloretanta buŝo – en Italujo estas multe pli bele kaj agrable. tie senĉese brilas la suno... bela vetero... tiel belaj oranĝaj arbaroj... Ne longe ni povos resti ĉi tie. kredeble ni ree veturos tien, kie estas tiel varme.

Czernicka volis surmeti al ŝi varman palteton, molan kiel lanugo, sed Helka sin elŝiris el ŝiaj manoj.

– Ah! – ekkriis ŝi – kiel longe mi jam ne vidis la sinjorinon; mi iros al la sinjorino! Adiaŭ, onklino!

Kaj ĵetinte per la mano kison al Janowa, ŝi forkuris saltante kaj kantante:

– Mi iros al la sinjorino. al mia kara. al mia ora. al mia plej amata.

– Kiel ŝi amas sian bonfarantinon! – sin turnis Janowa al Czernicka.

Tiuvespere sinjorino Evelino, ĉirkaŭvolvita per blanka negliĝa vesto, sidis antaŭ la tualetejo, malĝoja kaj sopiranta. Helka en sia skulptita lito, duone dronanta en la lanugoj, batistoj kaj brodaĵoj, jam estis profunde ekdorminta; du kandeloj en altaj ingoj estis forbrulantaj; post la apogseĝo de sinjorino Evelino staris Czernicka, kombante kaj dismetante por la nokta ripozo la korve nigrajn ankoraŭ kaj longajn harojn de sia sinjorino. Post momenta silento sinjorino Evelino sin turnis al la ĉambristino:

– Ĉu vi scias, mia Czernicka, mi havas embarason...

– Kian? kun kio? – demandis la ĉambristino per tono, plena de ama zorgemo.

Post mallonga momento de ŝanceliĝo sinjorino Evelino respondis per malforta voĉo:

– Kun Helka!

Sufiĉe longe poste ili silentis. Czernicka malrapide, delikate kondukis la broson sur la nigraj, silkaj haroj. Ŝia vizaĝo, rebrilanta en la spegulo de la tualetejo, estis vualita per medito. Post momento ŝi diris:

– La fraŭlino. kreskas.

– Ŝi kreskas, mia Czernicka... kaj oni jam devus zorgi pri ŝia eduko. Mi absolute ne volas preni guvernistinon en la domon, ĉar mi ne amas havi en la domo fremdajn personojn. vere, mi ne scias, kion fari.

Czernicka ree silentis unu momenton. Poste kun sopiro ŝi diris:

– Kia domaĝo, la fraŭlino ne estas plu tia malgranda infaneto, kia ŝi venis al ni.

Sinjorino Evelino ankaŭ eksopiris.

– Tio estas vera, mia Czernicka, nur tiaj malgrandaj infanoj estas vere amindaj kaj alportas puran ĝuon. Helka forlasis jam la plej agrablan infanan aĝon. Oni devas ŝin instrui, admoni.

– Jes, mi rimarkis, ke de iom da tempo vi estas devigata, sinjorino, sufiĉe ofte admoni la fraŭlinon...

– Jes. Ŝia karaktero forte ŝanĝiĝis. Ŝi fariĝis kaprica. ŝi koleretas kontraŭ mi pro bagatelo.



– Vi kutimigis la fraŭlinon al via eksterordinara boneco.

– Tio estas vera. Mi trodorlotis ŝin. Sed ne eble estas, plu dorloti grandan knabinon tiel, kiel mi dorlotis ŝin, kiam ŝi estis tiel malgranda, gracia. karesema.

– Malfacile estas, kontentigi la fraŭlinon. Hodiaŭ ŝi forte ekkoleris kontraŭ mi pro tio, ke kombante ŝin mi iom pli forte ektiris buklon de ŝiaj haroj.

– Vere? ŝi ekkoleris kontraŭ vi? Mi memoras, ke ankaŭ en la tempoj pasintaj ŝi ofte siblis kaj saltis sur la seĝo, kiam vi kombis ŝin. sed dum ŝi estis malgranda, tio estis tre amuza kaj pligrandigis ŝian ĉarmon. nun tio estan netolerebla. Mi dezirus esti malprava, sed ŝajnas la mi, ke ŝi estos. kolerulino.

– Vi kutimigis, sinjorino, la fraŭlinon al via eksterordinara boneco – ripetis Czernicka.

Ili eksilentis. La kombado de la haroj por la nokto jam proksimiĝis al la fino. Kun la vizaĝo klinita super la kapo de la sinjorino, sur kiun ŝi metis malpezan noktan kufon, Czernicka per voĉo multe pli mallaŭta kaj ŝanceliĝanta diris ankoraŭ:

– Eble vi havos, sinjorino, gastojn en la proksimaj tagoj.

– Gastojn! kiajn gastojn, mia Czernicka? kiun?

– Eble venos la sinjoro, kies koncerton vi aŭskultis en Florenco kaj kiu poste dum kelke da vesperoj tiel bele ludis ĉe vi.

Ruĝa nubo trafluis la vizaĝon de sinjorino Evelino, kiun la longa vojaĝo kaj la malfrua vespera horo faris simila al velkinta floro.

– Ĉu ne vere, Czernicka, ke li belege ludas? Li estas vera kaj granda artisto!

Ŝi viviĝis, ŝia voĉo fariĝis pli forta, la senbrilaj okuloj ree ekbrilis.

– Kaj kiel bela li estas! – murmuretis Czernicka. – Ĉu ne vere? Ho, italoj, se iu el ili estas bela, li estas bela kiel revo.

Per malrapidaj paŝoj ŝi trapasis la interspacon inter la tualetejo kaj la lito, kaj kiam ŝi jam estis senvestigita kaj Czernicka dismetis la litkovrilon en pentrindajn faldojn kaj drapiraĵojn, ŝi komencis paroli per revema voĉo:

– Mia Czernicka, mi petas vin, zorgu, ke ĉio en la domo estu bone kaj bele ordigita. Refreŝigu la salonon. kiel vi scias tion fari. ĉar vi posedas multe da bona gusto kaj lerteco. Eble okaze. iu alveturos al ni.

Dum multe da sekvantaj vesperoj inter sinjorino Evelino kaj Czernicka havis lokon ĉe la tualetejo mallongaj kaj interrompataj interparoladoj.

– Ĉu vi rimarkis, Czernicka, ke Helka malbeliĝas?

– Ŝajnas al mi, ke la fraŭlino ne estas plu tiel bela, kiel ŝi estis.

– Ŝi fariĝas tute malgracia. Mi ne komprenas, kiel ŝi ricevis tiel longajn kruroj. ŝia mentono ankaŭ strange longiĝis.

– Tamen la fraŭlino estas ankoraŭ tre bela.

– Ŝi ne estas tiel bela, kiel oni povis esperi antaŭ kelke da jaroj. Mia Dio! kiel fluas la tempo, fluas, fluas kaj forportas kun si ĉiujn niajn esperojn.

Sed en la sekvinta tago sur ŝia vizaĝo brilis dolĉa espero. Sur la tablo kuŝis bonodora letero, veninta el Italujo.

– Mia Czernicka, ni havos gastojn.

– Dio estu benata! Estos iom pli gaje por vi, sinjorino. De la reveno de la eksterlando vi estas ĉiam tiel malĝoja.

– Ah, mia Czernicka, kiel mi povas esti gaja! La mondo estas tiel malĝoja! Precipe la animoj, kiuj deziras idealojn, perfektecon, devas ĉiam senreviĝi.

Post momenta silento ŝi aldonis:

– Ekzemple, Helka. Kiel bela, aminda, amuza infano ŝi estis. kaj nun.

– De nia reveno de la eksterlando la fraŭlino ĉiam koleretas. aŭ eble estas malĝoja, mi ne scias.

– Malĝoja? Kiel ŝi devus malĝoji? Ŝi koleretas kontraŭ mi, ke mi ne plu senĉese zorgas pri ŝi, kiel iam. Mia Dio, ĉu mi povas dum la tuta vivo zorgi pri nenio alia, nur pri ĉi tiu infano?.

– Vi kutimigis, sinjorino, la fraŭlinon al via ekstrema boneco – ripetis Czernicka siajn vortojn.

Efektive Helka estis malĝoja, sed samtempe ŝi ankaŭ koleretis senĉese. Trodorlotitaj kaj nutrataj sole per agrablaj impresoj, ŝiaj nervoj malagordiĝis sub la influo de kontenteco, kies kaŭzon kaj naturon ŝi ne komprenis klare, sed kiu ĉiuminute ekscitis ŝian ploron aŭ koleron. Dum la kombado kaj vestado ŝi kriis nun kiel freneza, piedfrapis, kunpremis la pugnojn, preskaŭ batis la ĉambristinon Czernicka. Kiam sinjorino Evelino per silento aŭ duonvortoj

respondis ŝian karesan babiladon aŭ sin ŝlosis en sia dormoĉambro, la infano sidiĝadis en angulo de la salono, sur malalta piedbenketo, kaj kuntiriĝinte, kun grimace plenblovita vizaĝo, murmuretis al si mem kolerajn monologojn kaj dronis en larmoj. Poste ŝiaj ŝvelintaj kaj ruĝaj okuloj definitive konvinkis sinjorinon Evelinon, ke Helka estas kolerulino kaj rimarkeble malbeliĝas. Iufoje venis al la infano la penso, intence inciti la indiferentiĝintan zorgantinion; kiu povas scii, eble tiamaniere ŝi sukcesos turni ŝian atenton al si? Kiam sinjorino Evelino, kun la okuloj fiksitaj en libro, dronis en plej profundaj meditoj, Helka per kataj paŝoj, kun oblikva rigardo ŝteliris al la fortepiano kaj komencis tutforte, per ambaŭ manoj frapi la klavojn. Iam tia kakofonio, farata de ŝia edukatino, ekscitus gajan ridon de sinjorino Evelino kaj pluvon de kisoj por la infano. Sed nun Helka estis multe malpli amuza, kaj sinjorino Evelino dronis ofte en malĝojoj kaj sopiroj. Nun ŝi en tiaj okazoj salte leviĝis, kuris al la infano kaj punis ŝin per severaj admonoj, iufoje eĉ per malforta bato sur la petolaj manoj. Tiam Helka, ploranta kaj tremanta, falis antaŭ ŝi sur la genuoj, kisis ŝiajn genuojn kaj piedojn, murmuretante longajn pasiajn litaniojn de plej karesaj vortoj.

– Mia kara – diris ŝi – mia ora. mia plej kara. mi petas. mi petas.

Kaj kun levitaj okuloj, kun krucitaj manoj, genuante ŝi silentis. Ŝi sentis, profunde kaj dolore ŝi sentis, ke ŝi volas peti pri io, sed pri kio kaj kiel – ŝi ne sciis.

Dum unu el tiaj scenoj, iun tagon la lakeo, aperanta en la pordo de la salono, anoncis gaston kun itala nomo. Sinjorino Evelino, kiu kun sentema kaj bona koro, propra al ŝi, jam komencis esti tuŝita de la humila kaj plena de ĉarmo pozo de la infano kaj jam estis preta, kapti ŝin en sian ĉirkaŭprenon, – ĉe la sono de la nomo ektemis, rektiĝis kaj rapidis renkonte al la bela italo, al la glora artisto. eniranta en la salonon. Kiam ŝi salutis lin, la ridetoj kaj ruĝoj, kiuj kovris ŝian vizaĝon, faris ŝin simila al riĉe floranta rozo. La vizito daŭris longe – ĝis la malfrua vespero. La mastrino de la domo kaj la gasto parolis itale, kun granda vigleco, kun videbla deziro reciproke fari plezuron unu al la alia. Baldaŭ oni alportis la violonĉelon; sinjorino Evelino, sidante ĉe la fortepiano, akompanis la ludon de la fama artisto. Dum unu el la paŭzoj ili komencis interparoli pli mallaŭte – eble volis komuniki unu al la alia ion intiman kaj sekretan, ĉar iliaj kapoj sin klinis unu al alia, kaj la italo etendis sian manon al la blankaj fingroj de le virino, ripozantaj sur la klavoj, sed en la sama momento sinjorino Evelino forprenis sian manon, ŝiaj brovoj kuntiriĝis, esprimante malagraban impreson, malpacience ŝi mordis la lipon kaj komencis laŭte paroli pri la muziko. La kaŭzo de tiu subita incitiĝo de la animo kaj fizionomio estis, ke ŝiaj okuloj renkontis paron da infanaj okuloj, safiraj kiel la itala ĉie kaj fajraj kiel ĝi. Helka, kuntiriĝinta kaj silenta, fiksita sur ŝi sian rigardon, kiel vundita birdo. Ŝi sidis proksime sur malalta piedbenketo kaj el la ombro, falanta sur ŝin de la fortepiano, rigardis la zorgantinion kiel ĉielarkon. En ĉi tiu ardo, obstine direktita al unu punkto, oni povis legi plendon, timon kaj, peton. Dum la sekvantaj tagoj la gasto kaj sinjorino Evelino povis diri unu al la alia nenion intiman aŭ sekretan; ilia interparolado devis promeni sur malkovritaj vojetoj, ĉar Helka, preskaŭ tute ne forlasanta la salonon, bone komprenis kaj eĉ ne malbone mem parolis itale.

Post kelke da tagoj sinjorino Evelino, atendante sian karan gaston, sidis sur la kanapo, kun la frunto apogita sur la mano, dronante en sopira kaj dolĉa medito. Pri kio ŝi pensis? Kredeble pri tio, ke Dio en sia senlima boneco sendis sur la malluman kaj malvarman vojon de ŝia vivo varman kaj helan radion de la suno. Ci tiu radio fariĝis por ŝi la genia kaj bela homo, okaze renkontita en la vasta mondo, kaj nun adoptita de ŝi kiel kara amiko de la animo kaj koro. Ho, kiel gravan rolon ludos en ŝia vivo! Ŝi sentas tion per la pli rapida spirado de sia brusto, per la ondo de la vivo kaj juneco, kiu, ŝajnas, subite plenigis ŝian tutan estaĵon kaj kvazaŭ plenblovis la koron. Tiel malplena kaj enuiga, estis por ŝi la mondo, ŝi sentis sin tiel sola, tiel senrevigita de ĉio. Ŝi jam estis rigidiĝonta, jam proksimiĝis la maljuneco, morta apatio aŭ malluma melankolio jam minacis ŝin, kiam la Providenco pruvis ankoraŭ unu fojon, ke ĝi gardas ŝin, ke eĉ en la plej profunda malfeliĉo oni ne devas perdi la konfidon al ĉi tiu gardo. Rapide nur venu la genia, hela kaj kara amiko.

La medito de sinjorino Evelino estis interrompata de malgrandaj manoj, kiuj kvazaŭ neĝaj flokoj falis sur la nigrajn punktojn de ŝia vesto kaj nekuraĝe, petege kvazaŭ grimpis al ŝia kolo. Vekita, ŝi skuiĝis kaj haltigante la malpaciencon, delikate forpuŝis de si Helkan. Ŝi komprenis ŝian malpaciencon kiel gajan ŝercon. Tro longe ŝi estis amata, por facile ekkredi la repuŝon. Ŝi mallaŭte ekridis, karese kaj ree nekuraĝe dronigante la manojn en la punktoj, penis atingi kaj ĉirkaŭpreni ŝian kolon. Sed tiun ĉi fojon sinjorino Evelino salte leviĝis de la kanapo kaj sonorigis: – Fraŭlinon Czernicka!

Czernicka enkuris kun peco da silka teksaĵo en la manoj, kun silka fadenaro sur la kolo, kun multe da pingloj en la korsaĵo, forte ruĝiĝinta kaj rapidanta. Pli ol de unu semajno ŝi direktis fabrikon de novaj vestoj kaj kostumoj, instalitan en la vestejo.

– Mia Czernicka, prenu Helkan, kaj ŝi restu tie ĉe vi, kiam mi havas gastojn. Ŝi malhelpas min paroli kun la gastoj. Ŝi enuigas min.

– La fraŭlino estas neĝentila!

Kun ĉi tiuj vortoj la ĉambristino sin klinis super la infano, kaj sur ŝiaj lipoj glitis ŝia kutima rideto, iom sarkasma kaj iom malĝoja; ŝia brusto, kuntirita per nigra, malvasta korsaĵo, tremis de haltigata rido aŭ eble de kolero, oni ne scias. Preninte Helkan je la mano, kiu kun pala vizaĝo staris senmove kvazaŭ koloneto, dum unu momento ŝi fikse rigardis la vizaĝon de la sinjorino.

– La fraŭlino ŝanĝiĝis. – diris ŝi malrapide.

– Ŝanĝiĝis – ripetis sinjorino Evelino kaj sopirante, kun gesto de plej alta malkontenteco aldonis: – Mi ne komprenas, kiel mi povis tiel ami la enuigan infanon!.

– Ho! ĝi estis iam tute alia!

– Ĉu ne vere, kara Czernicka, tute alia... Ŝi estis iam bela... sed nun...

– Nun ŝi fariĝis enuiga. – Terure enuiga. Prenu ŝin, kaj ŝi restu ĉiam ĉe vi.

Czernicka elkondukis la ŝtoniĝintan kaj blankan kiel tolo Helkan. Ĉe la sojlo Czernicka ankoraŭ ekaŭdis:

– Kara Czernicka!

Ŝi returnis sin kun humila rapideco kaj flata rideto.

– Kaj mia vesto el malbrila silko? Zorgu, mi petas, ke oni bele aranĝu la manĝotablon. ne forgesu ankaŭ pri la deserto. Vi scias, italoj manĝas preskaŭ nenion krom fruktojn kaj glaciaĵon...

– Ĉio estos laŭ viaj ordonoj, sinjorino, mi petas nur pri la ŝlosiloj al la punktoj kaj ŝtofoj kaj pri mono por ĉio.

En la ĉambro de Czernicka estis silente. La horloĝo, pendanta super la senfunda kofro, sonoris la noktomezan horon. Proksime de la kurtenoj, ŝirmantaj la liton de la ĉambristino, apud la muro staris blanka lito infana, skulptita el nuksarbo, kun neĝeblanka litaĵo. Sur la tablo, apud kudromaŝino, brulis lampo, kaj sur la fono, bele lumigita de ĝi, estis klare videblaj la nigraj konturoj de la virino, diligente laboranta. Ĉe ŝiaj piedoj, sur malalta piedbenketo sidis Helka, vartante sur la genuoj la dormantan Elfon. Czernicka zorge kunmetis kaj kunkudris kokardojn el nigra silko, sed kiam el la profundo de la domo, el la salono, ŝiajn orelojn atingis kunigitaj, plendaj tonoj de la fortepiano kaj violonĉelo, ŝi fiksis sian nuban rigardon sur la kapo de Helka, klinita super la hundo, kaj delikate tuŝante ĝin per la fingro, armita per fingringo, diris:

– Ĉu vi aŭdas? Ĉu vi memoras? Ankaŭ vi iam estis tie!

La infano levis la vizaĝon, forte paliĝintan de kelke da tagoj, kaj silente rigardis la pli maljunan kunulinon per okuloj, plenaj de medito, kvazaŭ kunkreskinta kun ili.

– Kial vi tiel larĝe malfermas la okulojn, rigardante min? Kial vi miras? Prefere iru dormi. Vi ne volas? Vi pensas, ke la sinjorino vokos vin! Ne baldaŭ tio okazos. Mi iom kompatas vin. Ĉu vi volas? Mi rakontos al vi longan, belan fabelon...

Helka tiel saltis sur la seĝon, ke Elf vekiĝis. Fabelo! Iam ŝi ofte aŭskultis fabelojn, rakontatajn de sinjorino Evelino.

– Silentu, Elf, silentu! Sed ne dormu! Aŭskultu! La fabelo estos longa kaj bela.

Czernicka ĵetis sur la tablon pretan dekan kokardon, kaj komencante kunmeti dekunuan,

rigardis el sub la brovoj la infanon, iom gajigitan. Ŝiaj fingroj iom tremis, kaj la rigardo malĝojiĝis. Post momento per mallaŭta voĉo kaj ne ĉesante kudri, ŝi komencis:

– Estis foje, en nobela regiono, juna, beleta knabino. Ŝi vivis feliĉe ĉe la gepatroj, inter siaj fratoj kaj parencoj, sub la blua dia ĉielo kaj inter la verdaĵo de la amata tero, malfacile laborante, tio estas vera, sed sana, freŝa, ruĝa kaj gaja. Ŝi jam estis dekkvinjara kaj jam elektis ŝin knabo – najbaro kiel estontan edzinon, kiam subite, okaze ekvidis ŝin riĉa kaj tre bona sinjorino. La sinjorino ekvidis la junan knabinon foje, dimanĉe, kiam en festa vesto ŝi portis el la arbaro kruĉon da fragoj. La sinjorino ekvidis kaj tuj ekamis ŝin. Pro kio? Oni ne scias. Oni diras, ke la knabino havis belajn okulojn, eble beleta ŝi ŝajnis sur la verda kamplimo, en la ora tritiko, kun ruĝa rubando ĉe la kaftano kaj kun kruĉo da fragoj en la mano. La bona sinjorino alveturis en belega kaleŝo antaŭ la dometon de ŝiaj gepatroj kaj prenis ŝin kun si. Ŝi diris, ke ŝi donos al ŝi edukon, enkondukos ŝin en la mondon, certigos al ŝi estontecon kaj feliĉon. La estontecon. kaj fel. iĉon!

La du lastajn vortojn ŝi elparolis kun akcento, kun siblo, kaj ĵetinte sur la tablon la dekonuan kokardon, komencis kunmeti dekduan.

– Kaj poste? Kaj poste, mia fraŭlino Czernicka, kaj poste? – babilis la infano sur la piedbenketo. Elf ankaŭ ne dormis, kaj sidante sur la genuoj de la infano, per siaj du nigraj, rondaj okuloj kompreneme rigardis la vizaĝon de la rakontanta fraŭlino.

– Poste – jen kio estis. La bona sinjorino amis forte, forte la junan knabinon dum tutaj du jaroj. Ŝi ĉiam havis ŝin ĉe si, ofte kisis, instruis paroli france, gracie paŝi, paroli kaj manĝi, alkudri vitroperlojn sur kanvaso. poste.

– Kio estis poste! Kio estis poste?

– Poste ŝi komencis ŝin ami jam multe malpli, kaj fine, foje, okaze ŝi renkontis grafon. Tiam la juna knabino fariĝis tre enuiga kaj – iris en la vestejon. Feliĉe, ŝi havis multe da gusto kaj lerteco, la bona sinjorino ordonis instrui ŝin kudri kaj fari diversajn laboraĵojn. La knabino fariĝis ĉambristino. Sen la ekstrema boneco de la sinjorino, la knabino posedus nun propran dometon en la nobela regiono, edzon, infanojn, sanon kaj ruĝan vizaĝon. Sed la sinjorino certigis al ŝi la estontecon kaj feliĉon. De dek du jaroj ŝi kudras por la bona sinjorino elegantajn vestojn dum tutaj noktoj, akre admonas ŝiajn ĉambristinojn kaj lakeojn, ĉiumatene metas sur ŝiajn piedojn ŝtrumpojn kaj ŝuojn, ĉiuvespere faras el ŝia litkovrilo belajn drapiraĵojn. Ŝi estas apenaŭ tridekjara, sed ŝi havas la aspekton de maljuna virino. Malgrasiĝinta, nigriĝinta, ŝi komencas malsaniĝi je la okuloj. ŝia maljuneco baldaŭ venos, kaj ŝi devas memori pri tio. ah, ŝi devas memori pri sia maljuneco, ĉar se ŝi mem ne memorus pri ĝi, hodiaŭ, morgaŭ, kiam la bona sinjorino ekdeziros meti sur ŝian lokon iun alian en la vestejo, ŝi devos reveni en sian nobelan regionon, al la graco de siaj fratoj, kiel objekto de la homa rido, al. mizero! Jen la komenco de la fabelo!

Sur la tablo jam kuŝis dekkelko da pretaj kokardoj. Czernicka prenis longan, susurantan pecon da nigra silko kaj komencis dismeti ĝin en pentrindajn faldojn kaj volvaĵojn. Siaj fingroj tremis pli forte ol antaŭe, kaj la flavaj palpebroj rapide, rapide palpebrumis, eble por sufoki la larmojn, kiuj tremis sur la okulharoj. Ŝi ekrigardis Helkan kaj laŭte ekridis.

– Ah, – ekkriis ŝi – vi malfermis la okulojn, kvazaŭ vi volus engluti min. Ankaŭ la hundo fiksas sur mi siajn okulojn, kvazaŭ ĝi komprenus la fabelon. Ĉar tio estas fabelo. ĉu mi devas daŭrigi?

– Kio estis poste? – murmuretis la infano.

Czernicka kun granda graveco en la voĉo kaj sur la vizaĝo respondis:

– Poste – estis la grafo.

– Kaj poste?.

– Baldaŭ poste la sinjorino forveturis Parizon kaj en iu urbo, okaze, ekvidis belegan papagon, hele ruĝan, kun ruĝa beko.

Helka faris vivan movon.

– En Vieno. – ekkriis ŝi – en ĝardeno, estas multe, multe da papagoj, belaj, belaj.

– Jes, jes; – tiu papago estis ankoraŭ pli bela ol tiuj, kiuj estas en Vieno. La sinjorino ĝin aĉetis por si kaj forte ekamis. Dum pli ol unu jaro ŝi forlasis ĝin neniam. Por la nokto oni transportis ĝin kun la kaĝo el la salono en la dormoĉambron. La sinjorino instruis ĝin paroli france, nutris ĝin per plej bongustaj frandaĵoj, karesis ĝiajn plumojn, kisis ĝian bekon.

La faldado de la silko estis finita. Czernicka pendigis elegantan drapiraĵon kaj komencis enuigan krispigon de la ekstretoj de larĝa silka skarpo per kudrilo. Sub la batoj de la kudrilo la ŝtofŝtofo akre grincis, la horloĝo super la kofro sonoris la unuan horon, el la salono ree alfluis la tonoj de la violonĉelo kaj fortepiano, kvazaŭ sin ĵetantaj en pasian ĉirkaŭprenon, post pli ol kvaronhora silento.

– Kio estis poste? Kio estis poste? – murmuretis la senpacienca kaj samtempe tima voĉo de la infano.

Elf ne estis scivola pri la fino de la fabelo. Li ekdormis en la ĉirkaŭprenon de Helka.

– Poste. mi ne memoras plu kial kaj kiel, la papago fariĝis tre enuiga. kaj iris en la vestejon. En la vestejo ĝi fariĝis malĝoja, ĉesis manĝi, ekmalsanis kaj mortis. Sed la sinjorino tute ne ploris pri ĝi, ĉar ŝi havis belan hundon.

– Mi scias! Mi jam scias! – subite ekkriis Helka.

– Kion vi scias?

– La finon de la fabelo.

– Do diru.

– Ankaŭ la hundo iris en la vestejon.

– Kaj poste?

– Poste estis knabino.

– Kaj?

– La sinjorino amis la knabinon.

– Kaj poste – interrompis Czernicka – ŝi renkontis faman muzikiston.

– Kaj la knabino iris en la vestejon.

La lastajn vortojn Helka diris per murmureto apenaŭ aŭdebla.

Czernicka levis la okulojn de super la krispoj de la silko kaj ekvidis infanan vizaĝon je tre stranga aspekto. Tio estis malgranda, bele desegnita vizaĝo, blanka en la nuna momento, kiel oblato, kun du fluoj de silentaj, grandaj larmoj, malrapide ruliĝantaj sur la vangoj, kun du safiraj grandaj okuloj, kiuj de post la larmoj sin levis al ŝi kun senvorta, senfunda, ŝajnas, miro. Ŝi komprenis la fabelon. sed ŝi ne ĉesis miri.

Czernicka ree palpebrumis kelke da fojoj. Ŝi leviĝis kaj levis la infanon de la piedbenketo.

– Sufiĉe – diris ŝi – da fabeloj kaj maldormo... Vi povas malsaniĝi. Iru en la liton.

Ŝi senvestigis kaj kuŝigis la infanon, kiu tute ne kontraŭstaris, silenta kiel dormo kaj senĉese levanta al ŝi de post la larmoj siajn demandantajn okulojn. Poste ŝi prenis Elfon, kiu jam kuŝiĝis sur la piedbenketo, kaj metis lin sur ŝian litkovrilon, kredeble kiel konsolon. Ŝi sin klinis al la infano kaj tuŝis ĝian frunton per sekaj lipoj.

– Kion fari? – diris ŝi. – Mi ne estis malbona al la papago, mi ne estis malbona al Elf, mi ne estos malbona ankaŭ al vi. dum vi restos ĉi tie. Dormu!

Per malpeza eleganta ŝirmilo ŝi kovris la liton de la infano de la lampa lumo, revenis al la tablo kaj komencis kunkudri per la maŝino blankajn muslinojn. Sia seka kaj lerta brako rapide



movis la turnilon, kaj la rado de la maŝino bruis, ĝis en la antaŭĉambro la dormema lakeo fermis la pordon post la foriranta gasto. Ekstere jam brilis tiam la malfrua aŭtuna mateno. El la dormoĉambro de sinjorino Evelino eksonis sonorileto. Czernicka salte leviĝis de la seĝo kaj viŝante la okulojn, lacajn de la tutnokta laboro, rapide elkuris el la ĉambro.

## Ĉapitro III

Duonjaro pasis de la rea forveturo de sinjorino Evelino, kiu forlasis la urbon baldaŭ post la forveturo de la fama artisto el Ongrod. Eta, sed densa marta pluvo senbrue falis de la griza ĉielo, kaj kvankam ekstere pli ol unu horo mankis ankoraŭ ĝis la subiro de la suno, en la malalta, malgranda dometo de la masonisto Jan jam fariĝis mallume.

En la malklara kaj pluva printempa tago, du malgrandaj fenestroj lokitaj preskaŭ tuj super la tero, avare lumigis la sufiĉe vastan ĉambron, kun malalta plafono sur traboj, kun muroj, kovritaj per nigriĝinta kaj malglata stukaĵo, kun argila planko kaj granda forno por baki panon kaj kuiri, pleniganta preskaŭ kvaronon de la ĉambro. La forno estis granda, tamen inter la malnovaj, malaltaj kaj maldikaj muroj oni sentis la amasigitan rancecon kaj malsekecon. Krom tio ĉe la muroj staris tie benkoj, kelke da seĝoj el flava ligno, malgranda komodo kun sanktaj pentraĵoj, du malaltaj simplaj litoj, barelo kun akvo kaj barelo kun acidigita brasiko, kaj proksime de la forno mallarĝa kaj malalta pordo kondukis en etan kameron, dormoĉambron de la posedantoj de la dometo.

Nun la familio de la masonisto, kolektiĝinte en la malvasta ĉambro, sidiĝis por vespermanĝi. Jan, diktrunka, forta viro kun malmolaj starantaj haroj, densaj kvazaŭ arbaro, ĵus revenis de la laboro, demetis la antaŭtukon, ŝmiritan de argilo kaj kalko, kaj sidiĝis ĉe la tablo en veŝto kaj en manikoj de dika ĉemizo. Janowa, nudpieda, en mallonga jupo kaj tuko, krucita sur la brusto, kun dika senorda harligo, ĵetita sur la dorson, ekbruligis grandan fajron en la profundo de la forno kaj kuiris tie farunbuletojn. Apud la muro, sur lito, sidis kaj gaje babilis areto da infanoj. Ili estis tri: dek dujara knabo, diktrunka kaj forta, kun densaj kaj starantaj haroj, kiel la patro, kaj du knabinoj, ok kaj dekjaraj, nudpiedaj, en jupoj longaj ĝis la planko, sed ruĝvangaj kaj plenigantaj la tutan ĉambron per sia rido. Ridigis ilin tiel Wicek, kiu kuŝante sur la lito kaj strange petolante per la nudaj piedoj, rakontis al ili pri siaj aventuroj, travivitaj en la malsupera lernejo, kiun li vizitis de la komenco de la jaro. Ĝis kiam Janowa ekbruligis la fajron, povis ŝajni, ke en la ĉambro, ekster la gepatra paro kaj la tri infanoj, estis neniu. Sed kiam la brilo de la fajro lumigis la malluman kontraŭan angulon de la ĉambro, aperis ankoraŭ unu malgranda homa estaĵo, sidanta sur la alia lito. Tio estis knabino, ĉirkaŭ dekjara, kies vizaĝon kaj vestojn malklare kaj flagrante lumigis la flamo de la fajro, apenaŭ atinganta la angulon. Oni povis nur vidi, ke ŝi sidas sur la lito, krucinte sub si la krurojn, kaŝita en la plej profunda angulo, kuntiriĝinte de la malvarmo. Tuj apud ŝi brilis bronzaĵoj, ornamantaj malgrandan, sed elegantan kofron, el kiu du malgrandaj manoj, blankaj kiel oblato, elprenis de tempo al tempo diversajn malgrandajn objektojn. El la movo de la manoj oni povis diveni, ke la estaĵo, kuntiriĝinta de la malvarmo, longe kal zorge kombas per ebura kombilo siajn harojn, en kiuj la flagrantaj flamoj de la fajro iufoje ekbruligis orajn brilojn. Unu fojon ekbrilis ankaŭ spegulo en arĝenta kadro.

– Panjo, panjo! – ekkriis ia malpli granda el la du knabinoj, ludantaj sur la lito – Helka ree sin kombas kaj sin rigardas en la spegulo.

– Ŝi jam trian fojon sin kombas hodiaŭ, kaj jam du fojojn ŝi lavis siajn ungojn – malestime rimarkis la pli aĝa knabino.

– Elegantulino! Pupo! – aldonis la knabo – ĉu ŝi povas, kiel ni, sin lavi en la sitelo. Ŝi trempas la viŝtukon en la akvo kaj frotas sian vizaĝon. Mi rompos al ŝi la spegulon, ni vidos, kion ŝi faros tiam!

Kaj ĉiuj tri, brue piedfrapante per la nudaj piedoj, sin ĵetis al la malluma angulo.

– Donu la spegulon! Donu! Donu!

Du malgrandaj manoj, blankaj kiel oblato, silente kaj sen kontraŭstaro sin etendis el la ombro kaj transdonis al la petolanta areto la spegulon en la arĝenta kadro. La infanoj kaptis ĝin, sed ne kontentaj ankoraŭ de la akiro, detiris de la lito la kofron el angla ledo kaj sidiĝinte ĉirkaŭ ĝi sur la tero, komencis eble la centan fojon rigardi la kombilojn, brosojn, malplenajn boteletojn de parfumoj kaj skatolojn por sapoj.

Dume Janowa, tute ne atentante la kriojn kaj ridojn de la infanoj, eble eĉ amuzita de ili, parolis kun la edzo pri lia hodiaŭa laboro, pri la ĉagrenoj, kiujn kaŭzis al ŝi la najbarino, pri Wicek, kiu hodiaŭ, maldiligentulo, ne iris en la lernejon. Poste, portante al la tablo grandan pladon, de kiu leviĝis abunda vapore, ŝi alvokis la infanojn al la vespermanĝo.

Oni ne bezonis ripeti al ili la alvokon. Wicek kaj Marylka per unu salto jam estis sur la benko, apud la patro, al kiu ili ĵetis sur la kolon po unu brako. Kasia saltis al la tablo alkroĉite al la jupo de la patrino, kiu irante al la tablo tranĉis grandan bulon de nigra pano. Janowa sin returnis al la angulo.

– Helka! – diris ŝi – kaj vi, kial vi ne venas manĝi?

Helka deglitis de sur la lito, kaj kiam ŝi iris al la familia tablo, ŝia eta figuro, plene lumigita, strange, akre kontrastis la fonon, ŝin ĉirkaŭantan. Malgrasa kaj tro alta por sia aĝo, ŝi portis pelton el blua atlaso, ĉirkaŭkudritan per cigna lanugo. La atlaso estis ankoraŭ freŝa kaj brilanta, sed la lanugo, iam neĝe blanka, ŝajnis kvazaŭ eltirita el cindro. La pelto, jam tro mallonga por ŝia aĝo, atingis apenaŭ ŝiajn genuojn; pli malsupre, ŝiaj longaj, malgrasaj kruroj estis duonkovritaj per ĉifonoj de ŝtrumpoj, maldikaj kiel aranea reto, kaj per altaj botetoj, butonumitaj per longa vico da brilantaj butonoj, sed kun truoj, tra kiuj oni povis vidi la piedojn, preskaŭ nudajn. Ŝian longforman kaj malgrasan vizaĝon, kun la grandaj enfalintaj okuloj, ĉirkaŭis fajraj haroj, zorge kombitaj kaj zonitaj per multekosta rubando, sendube tute freŝa. Inter la malaltaj, malhelaj muroj, inter la nudpiedaj infanoj en dikaj vestoj, ŝia kostumo, la delikateco de ŝia vizaĝo, movoj kaj manoj, stampis ŝin per profunda disonanco kun la fono. Dum unu momento oni aŭdis nur la frapadon de la kuleroj je la plado kaj ŝmacadon de kvin buŝoj, kiuj manĝis kun granda apetito la farunbuletojn kun lardo kaj nigran panon. Ankaŭ Helka manĝis, sed malrapide, delikate kaj tre malmulte. Kelke da fojoj ŝi levis al la buŝo panon kaj

buletojn, kaj metinte la kuleron sur la tablo, sidis silente, kun la manoj krucitaj sur la genuoj, rektigita sur la seĝo, tiel alta, ke ŝiaj piedoj en la parizaj truitaj botoj ne atingis la teron.

– Kial vi ne manĝas plu? – sin turnis al ŝi Janowa.

– Mi dankas, mi plu ne volas – respondis ŝi kaj tremante de la malvarmo, ŝi kovris sin, kiom ŝi povis, per la atlasa pelto, tro mallarĝa kaj mallonga.

– Per kio vivas ĉi tiu infano, vere mi ne scias! – rimarkigis Janowa. – Se mi ne fritus al ŝi ĉiutage peceton da viando, ŝi jam de longe mortus de malsato. Eĉ la viandon ŝi neniam finmanĝas.

– Eh – kun flegmo rimarkigis Jan – ŝi kutimos iam, kutimos...

– Ciam estas al ŝi malvarme kaj malvarvarme... Niaj infanoj kuras nudpiede, sole en ia ĉemizoj, sur la korto, kaj ŝin ĉi tie en la ĉambro ĉe la forno, en ŝia kvazaŭ pelto senĉese skuas la febro.

– Eh – ripetis Jan – iam ŝi kutimos.

– Certe! – jesis Janowa – sed nun oni ne povas rigardi ŝin sen kompatato. Ofte mi varmigas la temaŝinon kaj donas al ŝi teon.

– Vi bone faras – jesis la masonisto – oni ja pagas al ni por ŝi.

– Oni pagas, estas vere, sed ne sufiĉe, por ke ni povu ŝanĝi nian mizeron en riĉecon por ŝi. – Superflue estus, ŝi kutimos.

Wicek kaj Marylka ne ĉesis ankoraŭ sin plenigi per pano kaj farunbuletoj. Kasia mokis ilin kaj malhelpis manĝi. Jan, viŝinte la buŝon per la maniko de la ĉemizo, komencis demandi la filon pri lia lernado kaj konduto en la lernejo; en la apuda kamero ekploris kelkmonata infaneto. Janowa, kiu estis portanta la pladon, kulerojn kaj duonon da panbulo al la forno, sin returnis al Helka.

– Iru, balancu Kazion kaj kantu al li, vi ja scias...

La ordonon ŝi proklamis per delikata voĉo, multe pli delikata ol tiu, per kiu ŝi parolis al la propraj infanoj.

Helka, obee kaj silente, per malpezaj kaj graciaj paŝoj, tute ne similaj al la vivegaj kaj pezaj paŝoj de la infanoj de la masonisto, sin enŝovis en la kameron, preskaŭ tute malluman, kaj post momento la unuton bruon de la lularkoj akompanis malforta, sed pura kaj plenda infana voĉo. Ŝi ne sciis aliajn kantojn ol francajn, sed de tiuj ĉi ŝi memoris multe. La franca kantado ĉiam same ekscitis la admiron de la familio de la masonisto, eble ĉefe tial, ke ĝi estis

nekomprenebla por ili. Ankaŭ nun eksilentis la infanoj. Jan, per ambaŭ kubutoj apoginte sin sur la tablo, kaj Janowa, lavante la vazojn ĉe la forno, silentis. En la malluma kamero unutone frapis la lularkoj, kaj la pura, malĝoja infana voĉo kantis melankolie, malrapide la amatan francan kanton:

*Le papillon senvola.*

*La rose blanche seffeuilla.*

*La la la la la...*

Janowa iris al la tablo, Jan levis la kapon. Ili ekrigardis unu la alian, balancis la kapojn kaj ekridis, iom ironie. iom malĝoje.

Jan eltiris el la brusta poŝo malfermitan koverton kaj ĵetis ĝin sur la tablon.

– Jen! Mi renkontis hodiaŭ la bienfarmanton de sinjorino Krycka. Li volis iri al ni, sed ekvidinte min, alvokis min kaj transdonis ĉi tion.

Janowa per siaj dikaj fingroj, kun videbla kaj profunda respekto elprenis el la koverto dudekkvinrublan bankan bileton, prezentantan la duonon de la sumo, kiun sinjorino Evelino promesis pagi ĉiujare por la nutrado kaj edukado de Helka, ĝis kiam ŝi fariĝos grandaĝa.

– Tamen – komencis Janowa – ŝi sendis. Dio estu benata, mi pensis, ke.

Ŝi interrompis, ĉar apud ŝi, ĉe la tablo stariĝis Helka. El la malluma kamero, kie ŝi balancis la infanon, ŝi vidis, kiam la masonisto donis al la edzino la koverton kun la mono kaj aŭdis la nomon de sia iama zorgantino. Tuj revenis ŝia iama viveco, ŝi desaltis de la lito de Janowa, apud kiu staris la lulilo, kaj saltis al la tablo, kun ruĝa vizaĝo kun brilantaj okuloj, ridetanta kaj tremanta, sed de emocio, ne de malvarmo.

– De la sinjorino – kriis ŝi – de la sinjorino, ĉu, ĉu.

Spiro mankis al ŝi.

– Ĉu la sinjorino skribas ion pri mi?

Jan kaj Janowa ree rigardis unu la alian, balancis la kapojn kaj ekridetis.

– Eh, vi malsaĝa infano! Ĉu la sinjorino skribas pri vi? Kia ideo! Ŝi sendis monon por vi. Estu danka ankaŭ por tio!

Helka tuj ree paliĝis, malĝojiĝis kaj, sin kovrante per la pelto, foriris al la forno. Wicek kaptis la koverton kaj legis al Marylka la adreson, skribitan sur ĝi, Kasia dormetis sur la

benko, kun la kapo metita sur la genuoj de la patro. Jan, prenante la bankan bileton el la mano de la edzino, komencis kun ŝanceliĝo en la voĉo:

– Eble, ni konservu por ŝi, por la tempo estonta. Por dudek kvin rubloj ni povas nutri la infanon, kaj la ceteraj, kolektiĝu.

– Kolektiĝu la ceteraj – respondis Janowa, medite apogante la mentonon sur la mano – sed, Jan, ne forgesu, ke oni devus nun aĉeti iom da vestoj por ŝi.

– Vestojn? sed oni ja permesis al ŝi kunpreni la tutan vestaron.

– Bona vestaro! Ĝi taŭgis por la palaco, sed ĉi tie. Ĉio estas tiel maldika, delikata... ĉu mi povas lavi tian tolaĵon... Pasis apenaŭ unu vintro, kaj en la kofro restis nur ĉifonoj.

– Bone, do ni aĉetu. Sed, virino, faru neniajn malŝparojn por ĉi tiu infano. Ŝi estu vestita kiel niaj, kaj se restos iu groŝo, konservu ĝin por ŝi por la tempo estonta.

– Kiel niaj infanoj, vi diras! Sed ŝi estas tiel delikata! Se ŝi faras unu paŝon sur la planko per nuda piedo, ŝi tuj komencas tusi. Se ŝi portas ĉemizon dum tri tagoj, ŝi ploras. Mi demandas: kial vi ploras? "La ĉemizo estas malpura!" – diras ŝi. La tutan tagon ŝi sin lavas, kombas en la anguloj, kvazaŭ katino.

– Ŝi kutimos – konkludis Jan, tamburante sur la tablo per la fingroj – ŝi kutimos...

Dum la interkonsiliĝo de la masonisto kun la edzino pri Helka, la infano staris antaŭ la forno kaj per la senbrilaj okuloj rigardis la estingiĝantan fajron. Oni povis vidi, ke ŝi profunde meditas pri io; post momento, kvazaŭ farinte kategorian decidon, ŝi returnis sin kaj, senbrue malferminte la pordon de la vestiblo, ŝteliris el la domo. En la strato estis multe pli lume ol en la domo, tamen la tago jam griziĝis, kaj la malvarma nebulo de la marta pluvo plenigis la aeron per penetranta malvarmo. En la nebulo, ĉe la randoj de la stratetoj kaj stratoj konataj de ŝi, Helka glitis en la komenco rapide, poste pli kaj pli malrapide. Dum momentoj, tre laca, ŝi haltis. En ŝia malvasta brusto mankis la spiro, la piedoj malbone vestitaj laciĝis; kelke da fojoj ŝi eksplodis per raŭka tuso. Tamen ŝi iris kaj iris, ĝis fine. Ŝi atingis la eksterurban straton, ĉe kies komenco, inter la arboj, nun senfoliaj, staris la somerdomo de sinjorino Evelino. Ŝi proksimiĝis al la feraj kradoj kaj rigardis en la ĝardenon! Ŝi iris antaŭen, al la pordego. En la pordego la pordeto estis malfermita. Tie, en la profundo de la korto, brilis fajro en du fenestroj de la flanka konstruaĵo, kie estis la loĝejo de la pordisto. Kredeble oni kuiris tie la vespermanĝon. Antaŭ la flanka konstruaĵo la pordisto dishakis lignan ŝtipon en splitojn. Estis silente kaj senhome. La batoj de la hakilo malakre kaj unutone sonis en la pluva nebulo, el la lada pluvtubo fluis sur la pavimon de la korto mallarĝa akva strio kun unutona murmuro. Helka proksimiĝis al la muro de la palaceto kaj eniris en la ĝardenon tra seka sablita vojeto. Tie ŝi haltis antaŭ la ŝtuparo de la alta balkono, sur kiu sinjorino Evelino kutime sidis la tutajn somerajn tagojn. Nun la ŝtuparo, balkono kaj benkoj, ĝin ĉirkaŭantaj, estis kovritaj de pluvo.

Helka komencis supreniri la ŝtupojn; la akvo plaŭdis sub ŝiaj parizaj botoj. Subite ŝi ĝoje ekkriis kaj per ama gesto etendis ambaŭ manojn. El sub benko, el angulo de la balkono. kie li kuŝis kuntiriĝinta kaj simila al silka volvaĵo, trempita en koto, Elf sin ĵetis al ŝi kun akra pepanta bojado. Li ne rekonis ŝin en la unua momento, ĉar liaj longaj haroj, malsekaj, implikitaj, preskaŭ tute kovris liajn okulojn. Sed kiam ŝi ekparolis al li kaj sidiĝis antaŭ li sur la malsekaj tabuloj, li saltis sur ŝiajn genuojn, kaj pepante de ĝojo, komencis leki ŝiajn manojn kaj vizaĝon. La estaĵo ankaŭ estis malgrasiĝinta, glaciiginta, kredeble malsata, malpura.

– Kara Elf! Elf! Mia amata, mia ora hundeto.

Ili karese sin premis unu al la alia kaj sin kisis.

– Elf! Kie estas la sinjorino? Kie estas la sinjorino? Forestas nia sinjorino, forestas, forestas!

Ŝi leviĝis, kaj portante la hundon en sia ĉirkaŭpreno, proksimiĝis al unu el la fenestroj, rigardantaj la balkonon. Ŝi sidiĝis sur la benko, sed tuj ŝi salte leviĝis.

– Ni rigardu tra la fenestro, Elf! Ni vidos, kio okazas en la ĉambroj. Eble tie estas la sinjorino, eble ŝi vokos nin.

Ŝi ekgenuis sur la benko. La akvo, abunde amasiĝinta sur la konkava tabulo de la benko, plaŭdis sub ŝiaj genuoj. Ŝi ne atentis tion.

– Rigardu, Elf, rigardu!

Ŝi levis la hundon kaj apud sia vizaĝo alpremis la krispan kapon al la fenestra vitro.

– Vi vidas, Elf... Ĉio estas, kiel iam... la puncaj flankaj kurtenoj, tiel belaj. kaj tie la granda spegulo, antaŭ kiu la sinjorino iufoje vestis min. kaj tie. tra la malfermita pordo oni vidas la manĝoĉambron. Ŝi eksilentis; ŝi manĝegis per la okuloj ĉion, kion ŝi povis rimarki en la interno de la loĝejo.

– Ĉu vi vidas, kara Elf, la balancantan seĝon. kiel komforte oni sidas sur ĝi... Iufoje mi sidis kaj balancis min... tutan horon. kaj mia pupo, la granda, sin balancis kun mi.

Elf laciĝis de la nekomforta situacio, elglitis el sub ŝia brako kaj falis sur la benkon. Deglitis sur ĝin ankaŭ baldaŭ la knabino.

– Ah, kara Elf! Vi kaj mi. estis iam tie.

Ŝi sidis en la akvo. Sia vesto estis tiel saturita de la malsekeco, ke ŝi sentis malvarmajn fluojn sur la dorso. Siaj piedoj, preskaŭ nudaj en la parizaj botoj, rigidiĝis. Tamen ŝi sidis kaj premis karese al sia brusto la malgrasan, malsekan Elfon, kiu de tempo al tempo lekis ŝiajn

manojn.

– Kara Elf, tie, kie nun estan tiom da koto, somere estas herbo, sur kiu tiom, tiom da fojoj mi sidis kun la sinjorino kaj kunmetis bukedojn. Ĉu vi memoras, Elf, Italujon? Estis mi, kiu petis la sinjorinon, ke vi veturu kun ni! Kiel bele estas tie, ĉu ne vere? Varme, verde... la suno tiel lumas... la safira ĉielo, super la maro flugas tiel grandaj, blankaj birdoj... Kaj ĉu vi memoras, kiel timis fraŭlino Czernicka navigi sur la maro? Kie estas nun fraŭlino Czernicka? Ŝi forveturis kun la sinjorino. Kaj ni, kara Elf, plu neniam forveturos kun la sinjorino. neniam. neniam.

Peza, ŝtona dormemo ekregis ŝin. Ŝi klinis la kapon al la dorso de la benko kaj ekdormis, ĉiam forte tenante ĉe la brusto la dormantan hundon. Fariĝis pli kaj pli mallume; eksilentis la hakilo de la pordisto, en la fenestroj de la flanka konstruaĵo estingiĝis la brilo de la fajro, eta, densa pluvo senĉese falis senbrue sur la teron, kaj nur ĉe la anguloj de la palaceto el la pluvtuboj fluis kun unutona murmuro mallarĝaj akvaj strioj.

Ĉirkaŭ la noktomezo la masonisto Jan vekis per frapoj la pordiston kaj ricevis respondon, ke efektive li vidas de tempo al tempo la infanon, kiu forlasis vespere lian domon. Jan supreniris kun lumigita lanterno la balkonon kaj apud unu el la benkoj haltis, kvazaŭ ŝtonigita. Li staris, rigardis, balancis la kapon kaj, oni ne scias kial, frotis la okulojn kvazaŭ nevole per sia dika mano. Post momento li levis per siaj fortaj brakoj la knabinon, kiu vekiginte, dormema, ploranta kaj malforta mallevis sian febre ruĝan vizaĝon sur lian brakon. Li portis ŝin malsupren de la balkono kaj per rapidaj paŝoj iris kun ŝi hejmen. Prenante la knabinon, li ĵetis for hundon, kiu dormis sur ŝia brusto. La hundo silente iris ree sub la benkon kaj, malĝoje sopirante, sin kunvolvis sur la malseka planko de la balkono.